# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (870) • 2008 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**



**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR



Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Pentekosto, la 10-an de majo | 51 |
| Unu tago el la vivo de ... | 55 |
| Informo pri digitala Biblio | 56 |
| Fundamentismoj danĝerigas la pacon | 57 |
| Bona konduto | 58 |
| El Dia Regno de la 50-aj jaroj | 60 |
| Junaj religiaj seminarianoj ferias kaj lernas enketante pri la sentoj-celoj de vizitantoj de sanktejo | 62 |
| Sekretaria jarraporto por 2007 | 64 |
| Financaj raportoj | 66 |
| Tagordo por la jarkunveno 2008 | 69 |
| Kaskontrolo | 69 |
| Aperas ĉe VoKo du serietoj | 70 |
| Sankta Luko pri la Regno de Dio | 72 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Meze de la nuna gazeto vi trovos kelkajn eltondaĵojn el malnovaj gazetoj. Dum la 50-aj jaroj oni inter alie ŝanĝis la profilon de la gazeto. Interese estas ankaŭ la ĉiama peto de kontribuoj de la redakcio. La tekniko tamen plifaciligas kaj rapidigas la laboron nuntempe. Mi same, kiel la tiama redakcio, esperas ke la evangelia tono daŭre sonos de la paĝoj de nia gazeto kaj ĝi servos kiel ligorgano inter kristanoj.

La ĉi-jara kongreso temos pri "Dia Regno", ne celante nian gazeton sed la veran Regnon de Dio, kiu laŭ Sankta Luko jam estas inter ni. Tiun kaj aliajn versiklojn de Luko, pri la Regno de Dio, vi trovos dorsflanke. Frontpaĝe mi ĉi-foje volas ilustri la belan naturon, kiu "proklamas" la faritaĵojn de Dio ankaŭ al tiuj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis pri Li. Ĝuu la someran belecon kaj vidu tie la "faritaĵojn de Liaj manoj" [Psa 8].

# Pentekosto, la 10-an de majo 2008

## Ekumena diservo en Essen, Germanio

pastro Albrecht KRONENBERGER, D
kaj pastoro Gerrit BERVELING, NL

Ĵus aperis nova tradukaĵo el la Biblio: LA DUAKANONAJ LIBROJ, VOLUMO 3 – iom simbole ni legas ankaŭ el ĝi fragmenton.

Unua legaĵo: 1 Ezra 3:1-2.4-5.10-12

**3:**1 La reĝo Dario organizis grandan bankedon por ĉiuj, kiuj estis sub li, por ĉiuj kiuj naskiĝis en lia domo, por ĉiuj nobeloj de Medujo kaj Persujo, 2 por ĉiuj satrapoj, generaloj kaj guberniestroj, kiuj estis sub li, en la cent dudek sep satrapejoj ekde Hindujo ĝis Etiopio.

[..] 4 La tri junuloj, kiuj kiel korpogardistoj prigardis la sekurecon de la reĝo, diris inter si: 5 Ĉiu el ni diru unu aferon, kiu estas la plej forta; kaj kies opinio ŝajnas la plej saĝa, al tiu reĝo Dario donu grandajn donacojn, kaj grandajn venko-premiojn.

[..] 10 La unua skribis: Plej forta estas la vino. 11 La dua skribis: Plej forta estas la reĝo. 12 La tria skribis: Plej fortaj estas la virinoj, sed ĉion venkas la vero.

(Prediko de pastoro Berveling)

Antaŭ multaj jaroj dum Pentekosta semajnfino okazis eŭropa E-kongreso en Luksemburgo. Tio estis por mi la unua internacia E-kunveno, kaj same kiel sian unuan amon oni kutime ne forgesas, ankaŭ tion mi ne forgesis. Dum tiu semajnfino okazis ankaŭ diservo. La predikisto komparis la E-movadon al la Pentekosta historio, kiun ĵus vi aŭskultis el la priskribo de Luko. Laŭ li, la multlingveco en la mondo – vidu la rakonton en *Genezo* pri Babel kaj ties turo – estas puno de Dio pro la malobeo de la homoj. Kaj Esperanto – liadire – estis kvazaŭ unua ĝermo en nia realo pri nova kaj espero-plena estonteco, en kiu la homaro vivos konkorde, kaj laŭ la ordonoj de Dio.

Sed ne tro rapide, nek tro simplanime oni faru tian identigon! Ĉar ĉe Luko ne primare temas pri lingvoj, pri lingvokonfuziĝo kaj ties malapero mirakla.

Se vi atente legas la tekston de *Agoj de Apostoloj*, kaj se vi ankoraŭ neniam ĝin faris, mi nepre konsilas al vi ĝin fari – estas nur kelkdek paĝoj – tiam vi konstatos, kion Luko efektive provas

Dua legaĵo: Eliro 19:1-6

**19**:1 En la tria monato post la eliro de la Izraelidoj el la lando Egipta, en tiu tago ili venis en la dezerton Sinaj. 2 Ili eliris el Refidim, kaj venis en la dezerton Sinaj kaj starigis sian tendaron en la dezerto; kaj Izrael stariĝis tie tendare antaŭ la monto. 3 Kaj Moseo supreniris al Dio; kaj la Eternulo vokis al li de la monto, dirante: Tiel diru al la domo de Jakob kaj sciigu al la filoj de Izrael: 4 Vi vidis, kion Mi faris al la Egiptoj kaj kiel Mi portis vin sur aglaj flugiloj kaj venigis vin al Mi. 5 Kaj nun se vi obeos Mian voĉon kaj observos Mian interligon, vi estos Mia amata propraĵo inter ĉiuj popoloj, ĉar al Mi apartenas la tuta tero. 6 Kaj vi estos por Mi regno de pastroj kaj popolo sankta. Tio estas la vortoj, kiujn vi diru al la Izraelidoj.

transdoni al ni: li parolas pri la formiĝo de la movado ĉirkaŭ la resurektinta Mesio, ĉirkaŭ Jesuo kiu releviĝis el la mortintoj (se uzi la klasikajn esprimojn): en lia rakonto ni trovas plurajn klarajn scenojn pri la formiĝo de "la" Eklezio.

Kaj pri kio tiam temas? Kio karakterizas tiun Eklezion? – Eble iom bedaŭre por ni nunuloj, ĉu tradicie ni estas kristanoj aŭ eĉ ne-religiemaj homoj: bedaŭre por ni, ĉe Luko ni renkontas nur tre malmulte el tio, kio por ni nunuloj kutime karakterizas la Eklezion: ne renkontiĝas ĉe li papoj, patriarkoj aŭ episkopoj – almenaŭ ne en la nuna formo; ja renkontiĝas ĉe li plurloke diakonoj kaj profetoj, ĉu viraj ĉu inaj – sed tiuj diakonoj (informas nin la historiistoj) ne multe similis la nunajn diakonojn nek en la tradicio de Romo, nek en la reformacia tradicio. Kaj kion niaeklezie ni faris el la profetoj? Nu, tiujn nuntempe ni nomas pastroj / pastoroj...

Sed ne tiuj estas la ĉefa temo de lia libro. Kion ni multe pli centre renkontas ĉe Luko, en *Agoj de Apostoloj*, estas: homoj, kiuj nove orientiĝis en la vivo pro ilia renkontiĝo kun Jesuo Mesio. Ni trafas malgrandajn komunumojn en plej diversaj urboj, kiuj – kaj nun mi citu – "(2:42) persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigado de pano kaj en preĝoj".

Kion ni renkontas ĉe Luko, estas Eklezio kiun plu instigas / plu stimulas / plu inspiras tiu mistera forto de Dio – la Spirito. Jam junaĝe mi aŭdis – kaj ĝi ĉiam ankoraŭ ŝajnas al mi tre senchava konstato – ke ĉe Luko ĉefe temas pri la Spirito, la Spirito de Dio, la Spirito homojn inspiranta.

Kaj ĝuste tial do, ili faris kion mi ĵus citis. Ĝuste tial tiu unua komunumo de Jerusalem estas pentrita tiel idealece. Ĉion ili havis komune inter si; ili estis veraj kunuloj en la plena senco de la esprimo: ili kune rompis la panon [=manĝis kune; multaj diras: kune celebris la eŭkaristion / la Sinjormanĝon], ili preĝis kune.

Ni "post-modernismuloj" tuj demandas nin, ĉu do vere estis tiel ideala

komunumo? Ĉu tio home eblas?

Feliĉe jam la sekvaj scenoj ĉe Luko mem montras, ke eĉ tie / tiam la homoj estis nuraj homoj, ne idealigeblaj estuloj: ankaŭ en tiu komunumo de Jerusalem montriĝas esti trompistoj, kiuj eble deziras pli profiti ol kontribui...

Tamen, restas la fakto, ke la mesaĝo de Luko ne unuavice temas pri lingvopolitiko, pri internacia lingvo k.s. – tio estis temo ekster lia horizonto. Luko serĉis / kaj predikis / komunumon nome de Jesuo Mesio, kiu vivu laŭ maniero ideala antaŭ Dio.

Do, nian E-movadon ni ne tro simplanime identigu je tio. Sed – iel mi jam kaŝe ĝin kun-diris: ankaŭ niajn kristanajn ekleziojn – kiun ajn (en la ideohistorio de nia homaro ja ne decidige gravas la nombro de l'aprobantoj): ankaŭ niajn kristanajn ekleziojn ni ne tro facile identigu je tiu "revo" de Luko.

Kion nun mi diras? "Revo" de Luko – kio? Ĉu Luko do ne estas nia plej unua historiisto de kristanismo? Ĉu *Agoj de Apostoloj* ne estu historie fidinda?

Tio dependas de la respondo, kiun oni donus al la demando, kio estas historie

Tria legaĵo: Agoj de Apostoloj 2:1-17

**2**:1 Kiam fariĝis Pentekosto, ĉiuj estis kune je unu loko. 2 Subite el la ĉielo estiĝis bruego kvazaŭ ekblovus forta vento, kaj tio plenigis la tutan domon, kie ili estis. 3 Aperis al ili fajraj langoj, kiuj disiĝis kaj eksidis sur ĉiun el ili. 4 Ili ĉiuj pleniĝis je sankta spirito, kaj komencis paroli en fremdaj lingvoj, laŭ tio kion al ili la spirito donis por eldiri. 5 En Jerusalem loĝis piaj Judoj, devenaj el ĉiu popolo sub la ĉielo. 6 Kiam ekestis tiu sono, la amaso kunvenis, kaj ili konfuziĝis, ĉar ĉiu unuope aŭdis ilin paroli en sia propra dialekto. 7 Mirigite ili sin demandis: Ĉu ne ĉiuj, kiuj tie parolas, estas Galileanoj? 8 Kiel do eblas, ke ni ĉiuj aŭdas <ilin> paroli en la propra dialekto, en kiu ni naskiĝis? 9 Partoj, Medoj kaj Elamanoj, loĝantoj de Mezopotamio, Judajo kaj Kapadokio, de Ponto kaj Azio, 10 de Frigio kaj Pamfilio, Egiptujo kaj la Libia regiono apud Cireno, kaj ĉi tie loĝantaj Romianoj, 11 Judoj kaj prozelitoj, Kretanoj kaj Araboj: ni ĉiuj aŭdas ilin *paroli* en niaj lingvoj *la grandajn farojn de Dio*. 12 Ĉiuj miregis, kaj en granda necerteco unu diris al la alia: Kion ĉi tio signifas? 13 Sed aliaj moke reagis: Ili plenas je mosto! 14 Tiam Petro paŝis antaŭen, kun la dek unu, levis la voĉon kaj tiel li alparolis ilin: Judoj, kaj ĉiuj <aliaj> loĝantoj de Jerusalem! Tion vi devas scii: do bone enoreligu miajn vortojn! 15 Ĉar ĉi homoj ne estas ebriaj, kiel vi supozas - estas ja nur la tria horo de la tago - ,16 sed ĉi tie okazas, kion diris la profeto Joel: 17 Okazos en la lastaj tagoj, diras Dio, ke *Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiujn homojn: profetos viaj filoj kaj filinoj, viaj junuloj vidos viziojn, viaj maljunuloj sonĝos sonĝojn*.

fidinda. En la Grek-Romia helenisma periodo en kiu vivis kaj verkis Luko – kaj nepre ne nur li – la idealo de la historiografio ja ne estis identa je tio, kion nuntempe ni nomas “historia objektiveco”. El mia dua fako – pri klasika filologio Latina kaj Greka – mi ja scias, ke la grandega idealo tiuepoke estis: portreti la historie gravajn personojn kaj okazaĵojn tiel, ke la leganto tuj sentu / travivu / spertu kion tiuj personoj kaj eventoj plej profunde SIGNIFIS. Moderna Nederlanda teologo antaŭ nelonge – iom troige, sed eĉ nur iom – nomis *Agoj de Apostoloj* “grandioza historia romano”. Luko pentras kvazaŭ idealojn, bildojn, epizodojn, kiuj dum la cetero de la vivo restos en via kapo, tiel lerte tion li faras. Kiu ja forgesas la belegan vizian bildon pri la dekdu apostoloj kune kun Maria kaj manpleno da aliaj, tute timo-plenaj, sin enŝlosinte en sia salono – ĝis, jen, venas la fortega ekblovo de l’ Spirito de Dio, la fajraj flamoj, la sono de la ventego, la erupcianta inspiriteco...!!! Kiu forgesos tiun bildon? Tamen – estas bildo.

Do, je Pentekosto unuavice TION ni festu: ni homoj, ni ja ricevis la vojmontrilojn al la Vera senchava Vivado.

Bildo, kiu montras, pri kio FUNDAMENTE temas: ni homoj, eĉ se ni DIRAS ke inspiras nin Jesuo Mesio – kaj tion kristanoj ofte asertas –, ni restas ĝenerale nur en nia propra eta rondo, ni nur kvazaŭ enfermas nin, defendante niajn ekleziajn kunvenojn kontraŭ la danĝeraj influoj de ekstere ... sed kion efektive Dio ordonas al ni? – Ke ni foje leviĝu, ke ni ekstaru, ke ni ekagu ankaŭ eksteren. Ni ne estis vokitaj por esti la torto, kiun manĝu la mondo. Ni ne estas vokitaj por fariĝi la plej bona parto de la homaro, sed ni ja estis vokitaj (diras Jesuo) por “esti la salo” en la torto, por “doni lumon” al la homoj, por ke ili vidu kien eblas paŝi.

Do, kion efektive ni festas je Pentekosto?

– La naskiĝdaton de la Eklezio. Jen iom tradicia sed bona respondo.

– Sed origine Pentekosto ne estas festo kristanisma: Judismo jam delonge festadis tiun daton, sep semajnojn post Pasko: post la ekiro el la *lando de premateco* (jen, kion signifas la Biblia Egiptujo: *micraim*), do post Pasko, sep semajnojn poste ni alvenas ĉe Sinaj, por tie aŭskulti la Ordonojn de Dio JHVH: se TIUJN “DEK PAROLOJN” ni homoj scios plenumi, nia mondo vivos multege pli pace ol ĝis nun...

Do, je Pentekosto unuavice TION ni festu: ni homoj, ni ja ricevis la vojmontrilojn al la Vera senchava Vivado. Kaj samtempe, paralele, sed kun kristanisma kun-sono, ni festas la datrevenon de la movado ĉirkaŭ Jesuo Mesio, la Eklezio. Kaj kiel esperantistoj ni rajtas plenfiere samtempe festi, ke la teruran miskomprenadon inter la homoj kaj popoloj – minimume *principe*, minimume “por komenci” – ni venkis per nia Internacia Lingvo, kiu montras ke homoj de bona volo ja kapablas interkompreniĝi - idee kaj lingve. Amen.

# Unu tago el la vivo de ...

Jacques TUINDER, NL

La vekhorloĝo neagrable laŭte anoncas la sepan horon. Mi akrobate saltas el la varme dorlota lito kaj pretigas dupersonan matenmanĝon. Je la oka mi prenas la biciklon, ĉar hodiaŭ mi volontule deĵoras en nia ŝatata revendejo, kies celoj estas kaj ekologia (reuzado de ĉio uzita) kaj bonfara (servado al projektoj en ekonomie malfortaj landoj, inter kiuj de Fondaĵo Evidente).

Kiam mi alvenas, kolego jam estas plenpleniganta la ŝarĝaŭton per ĉiaj nevendeblaj aĵoj. Kune kun li kaj tria helpanto mi veturas al la rubodeponejo, kie en apartajn ujegojn ni devas elĵeti la plej diversajn materialojn kaj objektojn. Ĝuste en tiu loko oni povas sperti, kiom da valoraĵoj kaj defalaĵoj prospera socio kun riĉa ekonomio elsputas. Ĝi estas loko, kiu pensigas homojn kun filozofiema naturo. Mi komparas nian superordigitan kaj perfekte organizitan defalejon kun tiuj en aliaj landoj kie loĝas ciganoj, fakte homoj ankaŭ elsputitaj. Ho, kiam ili povus labori en nia deponejo, ili gajnus en unu tago pli ol dum tuta jaro sur propra tereno! Antaŭ nelonge mi rimarkis tie en stokejo du belegajn blankajn ĉemizojn, neniam surhavitajn kaj eĉ en la originala plastiko pakitajn ...

Kiam la revendeja aŭto estas malplena, ni forveturas al vilaĝo iom ekster niaj komunumaj limoj. Tie ni vizitas domon, en kiu loĝis antaŭ kelke da semajnoj maljuna viro, kiu komencis malzorgi sin kaj do eniris flegejon. Parencoj petis al ni kunpreni ĉiujn vendeblajn meblojn, aparatojn, murornamaĵojn, laborilojn, librojn, vestaĵojn, ktp. Ni kelkhore tre diligente laboris por plenumi tiun gravan taskon. Fakte ankaŭ agrabla tasko, ĉar oni konfidis al ni grandan kapitalon, kvankam ankoraŭ ne en monera formo! Mi komprenas ke aĉetontoj havas antaŭ la okuloj mediprotektan intencon sed samtempe servas al foraj homoj, kiuj vivas en mizeraj cirkonstancoj. Ankaŭ, kiel mi jam diris, homoj kun vidhandikapo – ĉijare i.a.: aprile en Ukrainio kaj junie en Rumanio – estas vidataj kaj helpataj!

Post la laboro mi durade rapidas hejmen por pretigi min por tute malsama programero. Kune kun kvar aliaj homoj – teologo, pac-aktivulo, libervola helpantino al rifuĝintoj kaj stratĵurnalon vendanta sentegmentulo – mi direktos min al la ĉefa biblioteko, kie ni aperos kiel 'dupiedaj libroj'. En la loka gazetaro oni anoncis nian venon; homoj, kiuj ŝatas legi nian vivorakonton, povas nin 'pruntepreni' dum duonhoro. La 'libro' demandas al la 'legonto': "Kial vi volas legi ĝuste min?" kaj la lasta respondas: "Mi ekinteresiĝis pri ĉi tiu libro kiam en la gazeto min frapis superrigardo de la enhavo!" Sur mia listo mi trovis kvar personojn... Estis tre interesaj dialogoj,

kiuj eble povas konduki al novaj kontaktoj. En nia biblioteko oni ĉiutage povas pruntepreni librojn, sed nur unufoje en la monato homojn.

Kiam mi vesperkomence alvenis hejmen, mi devis iom alivesti min por veturu min kun mia edzino Vera al la benediktana abatejo en nia regiono. Tie mi du tagojn en la semajno volontulas kiel kandelfaristo, pordisto kaj dekstra mano de la monaĥo kiu zorgas pri la gastoj. Kolektiĝis abato, monaĥoj, dungitaro kaj volontuloj (entute sesdeko) kadre de ĉiujara celebro. Tio estas tradicio jam tre longa. Ni sidas en salono, kiu ekspozicie prezentas belegajn ikonojn, de rusaj infanoj faritajn sub gvido de majstra pentristo. Multaj, tre multaj homoj ĉiujare venas por viziti tiajn aranĝojn, precipe por lernejanoj tre allogajn.

Je la naŭa tridek mi puŝis la ŝlosilon en la pordon de nia loĝejo kaj nur tiam mi havas eblon legi la ĵurnalon, trarigardi kaj respondi poŝtaĵojn, reagi al telefonoj, k.s.

Iom post noktomezo estis tempo por enlitiĝi. Kaj mi pripensas ke hodiaŭ mian vivon ne karakterizis problemo de kelkaj aĝaj homoj: kiel mi pasigu mian liberan tempon? Mi dankis al la ĉielo pro ĉi tiu riĉa tago, pro trezora edzino, bonaj gefiloj kaj genepoj, multaj amikoj kaj kolegoj, bona sano, neelĉerpebla energio, kaj vidpovo kiu ne neglektas vidi homojn kun vidhandikapo trans multaj limoj. Ĉu mi malprave epitetas min homo benata kaj privilegiita?

ꝏ

---

Karaj,
mi faris el la tuta Biblio unu dokumenton tiel, ke ĉiu versiklo komenciĝas per indiko de libro kaj ĉapitro, ekzemple:

> Rom 1:1 Paŭlo, servisto de Jesuo Kristo, apostolo vokita, apartigita al la evangelio de Dio,
> Rom 1:2 kiun Li promesis antaŭe per Siaj profetoj en la sanktaj skriboj,
> Rom 1:3 pri Sia Filo, kiu naskiĝis el la idaro de David laŭ la karno,

Tiamaniere oni povas facile traserĉi la tekston helpe de la propra komputila serĉilo. Se vi volas havi tiun ĉi dokumenton por via komputilo, skribu retmesaĝon al: albrecht.Kronenberger@t-online.de

Elektu inter jenaj formatoj:
- .txt (nura teksto unikoda) 4,5 MB
- .pdf 5,1 MB
- .htm 5,4 MB
- .doc (Word) 10,8 MB

Kore salutas vin

*Albrecht*

# Fundamentismoj danĝerigas la pacon

pastoro Jürgen Spengler, DE
tradukis Siegfried Krüger, DE

Fundamentismo timigas, ĝi gvidas en perforton kaj neniigon mondvaste kaj ekzistas diversmaniere:

- **religia**: radiko estas la absoluta pretendo de nur unu religio super la spirito de aliaj
- **kultura**: kun sento de altvaloreco de kulturo super la ŝajna malaltvaloreco de alia kulturo
- **etna** se speco da homoj dubas pri la ekzistrajto de ŝajne malaltvaloraj popoloj kaj postulas ties subpremon aŭ ekstermon
- **politika** de registaroj, kiuj en ilia sendkonscio volas perforte enkonduki ilian ŝtatformon
- **socia** se financaj elitoj volas ellimigi ŝajnajn parazitojn.

Fundamentismo ne estas ligita al destinitaj grupoj, ĝi ekzistas en ĉiuj religioj inkluzive de la kristanismo, en ĉiuj kulturoj, en ĉiuj popoloj, en ĉiuj ŝtatoj, en ĉiuj sociaj grupoj.

Fundamentismo estas praa skurĝo de la homaro, pligrandiĝis en la 20a jarcento kaj havas hodiaŭ globalan dimension.

Fundamentismo havas diversajn formojn sed similajn karakterizaĵojn. Tipa estas reduktita mondbildo, reduktita al alternativoj:

bona – malbona;
nigra – blanka;
vivinda – malvivinda;
moderna – mezepoka
vereco – blindigo

La rigardo estas limigita kaj vidas kiel fundamentistoj ĉiam la aliajn, neniam sin mem.

Tipa estas la supertaksado de la propra grupo kaj subtaksado de la aliaj ĝis tiel, ke oni ne akceptas ilian homestadon. La nomigo kiel parazitoj ne nur minacas la dignon, sed unue efikas neniigon per vortoj.

Tipa estas la sento de konvinkiteco: Al ĉiuj, kiuj pensas fundamentisme, estas klara la ĝusteco de la propra imago. Tia penso ne bezonas motivigon. Ĝi simple estas tia, ĝi estas ekster ĉia argumentado kaj pro tio ne malferma al kritikemaj demandoj. Memkritiko por tia pensmaniero ne eblas kaj pro tio ankaŭ ne penskonvertiĝo. Kio ajn okazas, ĉiam la propra interpreto estas fortigita kaj cementita.

Tipa estas la konscio pri vokiteco: La propra grupo estas vokita kaj kapabla alporti savon al la mondo, gracon, la modernismon. Ĉar nur la propraj homoj kapablas tion, ĉiuj rimedoj kontraŭ la aliaj estas permesataj. Ankaŭ perforto kaj neniigo. Homaj sentoj ne estas akceptitaj; la aliaj devas esti devigataj al sia feliĉo.

Tia fundamentisma pensmaniero ĉiam denove regas homojn kaj disvasti-

gas timon kaj mortigon. Kelkaj ekzemploj: la perforta misiado de la indianoj per la kristanoj, la pogromoj kontraŭ judoj dum la krucumaj semajnoj, mortigminacoj de la mahometanoj kontraŭ konvertitoj, la neniigo de la bosnianoj per la serboj kaj de armenoj per la turkoj. La ekzemploj el la 20a jarcento estas sen nombro. La fundamentismo postlasis sangan ŝpuron. Ni devas esti atentemaj, ĉu ne ankaŭ nia sinteno, ke en la orientaj kaj sudaj regionoj de la tero devus esti homrajtoj kaj demokratio realigotaj – eĉ per forto – ne estu fundamentisme. Ankaŭ la krucmilitoj estis realigitaj kun plej bona konscienco, altvalora konvinko kaj el la sento de necesceco devigi la aliajn por ilia savo. Ni devas esti tre memkritikaj, por kontraŭstari fundamentismajn tentojn.

Lasu nin pripensi fundamentismon de la kruco de Jesuo. La morto de Jesuo estis praktikata de potenca elito sub relegia preteksto. Eble ankaŭ la partoprenintoj estis konvinkitaj, devige fari la neceson por la plej bono de la homoj. La morto de Jesuo malpravigas ilin. Por ni kristanoj Jesuo partoprenas al morto de tiuj, kiuj viktimiĝas.

Oferi homojn, ankaŭ por bona afero, estas peko kontraŭ Dio kaj estas krimo. Ĉar ĉiuj homoj estas inklinaj al fundamentisma pensmaniero, la kruco de Kristo devigas nin al memekzameno kaj memkritiko. Jesuo mortis por ĉiuj homoj – speciale por la kulpiĝintaj kaj erarvagintaj. Lia morto volas liberigi homojn el iliaj blindecoj kaj kaptitecoj. La kristana kredo pro tio ne rajtas liveri la farbon por nigrigi aliajn, sed ĝi malfermas la rigardon, ke tiuj, kiuj estas al ni fremdaj, estas homoj.

Laŭ Paŭlo la morto de Jesuo turnigas ĉiujn kvalitojn. Ekde tiam ni devas konsideri, ke povas esti ĉe aliaj la bono kaj ĉe ni mem la malbono. La morto de Jesuo kaj lia resurekto donas la esperon, ke ekzistas elirvojoj el la morto kaj el malĝustaj vojoj. La fundamentismo de ĉiuj specoj estas kaptilo de la pensado, en kiuj homoj estas implikitaj.

Fundamentistoj ne ĉiam estas malbonuloj, sed ofte kleraj kaj profunde religiaj homoj. La fuĝo el ĉi tiu kaptilo ofte estas miraklo. Ekde Pasko ni povas kalkuli kun mirakloj – eĉ kontraŭ la morto kaj ties helpantoj. Eble estas sortotasko de la 21a jarcento trovi elirvojojn el fundamentisma ligiteco. Mi estas konvinkita, ke religioj, ankaŭ la kristana religio, estas packapabla kaj povas agi racionalisme kaj repacige.

Aldone:
Kiu partoprenas la ekumenon ne povas esti kristana fundamentisto, ĉar li atestas per sia membreco, ke li ankaŭ aliajn formojn de la kristanismo respektas.

ℰ𝒟

---

La nocio religia **fundamentismo** (aŭ fundamentalismo) laŭ Vikipedio:
pensado kaj konduto, kies celo estas la reveno al la radikoj de religio aŭ ideologio.
La PIVa vorto por la sama koncepto estas "integrismo".

Red

# Bona konduto

MU Binghua, Ĉinio

Antaŭ kelkaj jaroj, en nia urbo estis du erudiciuloj – unu loka, la alia aliloka. Foje ili amikece disputis pri teatraĵa vidpunkto apud strato antaŭ nia universitato. Mi estis subtenanta opiniojn de la loka erudiciulo, kiun mi konis. Mi staris inter ili kaj estis preta eldiri mian aprobon al li tuj post la fino de la disputado.

Ĝuste en tiu momento preterpasis mezaĝa virino veturanta per biciklo kaj subite falegis teren pro paneo de la veturilo. Ŝi kuŝis meze de la strato, kaj forte kontuziĝis kaj frotvundiĝis. Kiam ni ĉiuj ankoraŭ ne ekagis kontraŭ la neatendita okazo, nur la aliloka erudiciulo grandpaŝe kuris al ŝi kaj tutforte levis ŝin el la cementa planko. Mi kaj aliaj preterpasantoj rapide alproksimiĝis al li por doni helpon. Dum subtenante la virinon, ni paŝon post paŝo iris al la stratoflanko, mi ekvidis, ke tiu loka erudiciulo estas senmove staranta. Evidente li rigardis la suferintinon de la akcidento kun indiferentaj okuloj. Li trankvile ekbruligis alumeton, fumis cigaredon kaj pripensis novajn vortojn por pludisputi.

”Estas feliĉe, ke ŝi vundiĝis ne grave,” diris la erudiciulo el la aliloko. Frapante sian veston, li revenis la originalan lokon.

”Pri la problemo, ĉu la detaloj de la teatraĵo estas racionalaj aŭ ne …” senprokraste daŭrigis la interrompitan disputadon la loka erudiciulo.

Estis ĝuste je la denova komenco de ilia interparolo, kaj mia sinteno kaj humoro ambaŭ havis delikatan ŝanĝon. Mi kompreneble sciis, ke la homa konduto kaj ties koncepto ne ĉiam povas esti prenataj por tutegalaĵoj. Sed tio neniel detenis miajn orelojn en tio, ke ili sentis sin tre komfortaj, kiam tuj poste ili aŭskultis voĉon de la aliloka erudiciulo kun bona konduto. Kvankam mi ankoraŭ ne konsentis kun li, tamen mi perceptis specon de komforta nekonsento, kvazaŭ samtempe perceptus ankaŭ specon de konsento ne tiel komforta.

La aŭtoro skribis iom pri si mem kaj sia situacio al Siegfried KRÜGER. Tion li skribis antaŭ la granda tertremo, kiu ankaŭ frapis lian regionon:

„Ĉijare mi estos 65jaraĝa. En la komenco de 1990aj jaroj mi fariĝis Esperantisto. Antaŭ mia emeritiĝo mi estis instruisto pri matematiko en mezlernejo. Kiam mi restis en mia ofico, mi havis salajron de po 1500 juanoj monate. Sed kiel ordinara emerito nun mi ricevas 1200 juanoj. Ĝi egalas nuntempe ĉirkaŭ 120 EUR. Ekde 2005 en Ĉinio preskaŭ ĉiuj varoj kelkfoje levis siajn prezojn. Kvankam en la lastaj jaroj la ĉina ekonomio draste kreskas, tamen pro la multegaj loĝantoj la registaro ne povas fari la plimulton da ĉinoj pli riĉa. Hodiaŭ en nia lando estas tre ofte videbla fenomeno, ke malmultaj riĉiĝas kaj multaj malriĉiĝas.

Mi havas unu filon kaj unu filinon. Ili ambaŭ jam organizis sian propran familion kaj ne loĝas kune kun ni. Pro la malbona situacio rilate al la familia enspezo, kiu ne povas kovri nian elspezon, ek de la pasinta jaro ni komencis vivi mizere.

Aprilo—Majo 1951 N:oj 4—5

# DIA REGNO

KRISTANA GAZETO INTERNACIA

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA K.E.L.I.

la Evangelio per Esperanto

Prezidanto kaj resp. eldonanto: Erik Carlén, Hällabrottet, Svedujo.
Sekretario: D. de Boer, Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando.
Kasistino: F-ino Karin Larsson, Hällabrottet, Svedujo.
Redaktoro: R. v. Spronsen, Soestdijksekade 938, Den Haag, Nederlando.
*Kotizoj 1951: Rekta membro kun gazeto 6:— sv. kr. Sekcia membro kun gazeto 5:— sv. kr. al la internacia kaso. Nura abono 5:— sv. kr.*

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo kaj la savon kaj pacon.

El Dia Regno 1951

## NOMBRO DE LEGANTOJ

Nuntempe Dia Regno estas sendata regule al adresoj en jenaj landoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Acoroj | 1 | Islando | 1 |
| Aŭstralujo | 4 | Italujo | 5 |
| Aŭstrujo | 3 | Japanujo | 13 |
| Belgujo | 2 | Jugoslavujo | 4 |
| Brazilo | 5 | Kanado | 2 |
| Britujo | 36 | Madejro | 1 |
| „ Skotlando | 4 | Maroko Franca | 1 |
| Bulgarujo | 5 | Nederlando | 215 |
| Cipro | 1 | Ned. Antiloj | 1 |
| Ĉeĥoslovakujo | 63 | Norvegujo | 26 |
| Ĉinujo | 2 | Polujo | 8 |
| Danujo | 14 | Portugalujo | 5 |
| Egiptujo | 1 | Sud-Afriko, Kap-Prov. | 2 |
| Finnlando | 8 | „ Pretoria | 1 |
| Francujo | 33 | „ Transv. | 1 |
| Germanujo Okcid. | 70 | Svedujo | 397 |
| „ Orient. k. Berl. | 12 | Svisujo | 27 |
| Grekujo | 1 | Turkujo | 1 |
| Hispanujo | 4 | Usono | 17 |
| Hungarujo | 13 | Sumo el 39 landoj | 1.010 |

Efektive la nombro de legantoj estas pli granda pro familia membreco kaj aliaj cirkonstancoj. Ankaŭ la kalkulita sumo **ne** egalas kun la KELI-membronombro, kiu en kelkaj landoj estas pli granda, en aliaj landoj malpli. Ĉiumonate estas krome disponigataj pli ol 100 ekz. por la diverslanda varbado al sekcioj kaj reprezentantoj. De la sekretario kaj aliaj postenuloj estas uzataj ĉ. 50 ekz. ĉiumonate.

La preskostoj estas ĉijare preskaŭ duobligitaj kompare al la pasinta jaro, kial ni nepre bezonas pli da pagopovaj legantoj. Vi, kiu ŝatas la nunan aspekton de nia organo kaj konsentas pri ĝia enhavo, helpu nin ĉiamaniere per varbado. Antaŭdankon!

El Dia Regno 1956

## ★ Alvoko p

*Tri gvidantoj d*
*Eklezioj, en No*
*klaris, ke „Kri*
*„profunde ŝokit*
*„gika renversiĝ*
*„kiu klare espr*
*„nedependa en*

Jen estas la esperai
la deklaro pri la hu

Kristanoj tra la tu
kaj dolore frapitaj p
feras la hungara pop
ron esti libera kaj ne
La Prezidanto kaj V
tato de la Universala
Ĝenerala Sekretario
pri la senprokrasta
apelacio al eklezioj k
ston Asembleo. Ili s
ke timo kaj suspekt
respekto kaj konfido
jugon, kiu hodiaŭ m
elekti siajn proprajn
instigas al la membr
tiu ĉi celo. Kiel anka
devas subteni ĉiujn l
feras doloron kaj so
frateco restos nerom
miĝos en preĝado p
horo de tento kaj p
nia krucumita kaj re

Franklin Clark Fr
tato.
Ernest Payne, Vic-
W. A. Visser 't Ho

★ ★ ★

Jan.-
Febr.
1952

# DIA

OFICIALA ORGANO DE KRI

## or Hungarujo

*le la Universala Konsilantaro de*
*vjorko, Londono kaj Ĝenevo, de-*
*stanoj tra la tuta mondo estas*
*aj kaj dolore frapitaj per la tra-*
*o, kiun suferas la hungara popolo,*
*rimis sian deziron esti libera kaj*
*nacia kaj eklezia vivo."*

nta traduko de la plena teksto de
ngara katastrofo:
ta mondo estas profunde ŝokitaj
er la tragika renversiĝo, kiun su-
olo, kiu klare esprimis sian dezi-
dependa en nacia kaj eklezia vivo.
ic-prezidanto de la Centra komi-
Konsilantaro de Eklezioj kaj ĝia
rememorigas la membro-ekleziojn
publikigo de iuj konstatoj en la
aj registaroj adoptita de la Evan-
peciale atentigas pri la konstato,
o ne povas esti anstataŭataj per
se ne potencaj nacioj forigas la
alebligas al aliaj nacioj, libere
registaron kaj socian formon. Ni
ro-eklezioj daŭrigi la serĉadon de
ŭ decidite en Evanston, Kristanoj
kiuj, en la batelo por libereco, su-
rtobatojn. Nia unueco en ĉi tiu
pita, kio ajn okazos, kaj ĝi espri-
or la popolo de Hungarujo en ĝia
or la eklezioj en ilia atestado pri
leviĝinta Sinjoro.

y, Prezidanto de la Centra Komi-

prezidanto de la Centra Komitato.
oft, Ĝenerala Sekretario.

★ ★ ★ ★ ★

REGNO

N:oj
1—2
1952

STANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA

# La redaktado de Dia Regno

El Dia Regno 1952

de Erik Carlén

Unu homo neniam povas fari plenvaloran gazeton eĉ ne tian malgrandan kiel D. R. En gazeto pluraj personoj devas kunlabori por atingi la plej bonan rezulton. Tiel ankaŭ okazas en nia ligorgano. Ne estas fanfarono kiam mi diras, ke D. R. estis bona laŭ enhavo, laŭ stilo kaj aranĝo. Multaj diris tion kaj ili pravas. Mi mem legas multajn Esperanto-gazetojn kaj mi havas okazojn kompari.

Ni devas ankaŭ estonte fari bonan evangelian gazeton en Esperanto. Ne pro ni mem sed pro Dio, por servi al Li. Nia laboro ankaŭ donis fruktojn por la eterneco. Pluraj homoj per D. R. kaj la agado de KELI trovis savon en Jesuo Kristo.

Tial estas la devo de ĉiuj, kiuj iom povas skribi kaj prijuĝi tian aferon, kunlabori en nia gazeto. Mi ofte renkontis KELI-anojn kun pozitiva kritiko de D. R., kun novaj bonaj proponoj. Sed ili nur havas tion buŝe kaj se oni volas havi tion skribe por enpresigi en la gazeton ili neniam havas tempon. Ekzistas feliĉe gefratoj, kiuj estas esceptoj kaj ankaŭ skribas. Kaj nur pro tio ni havas bonan gazeton.

Ĉu vi komprenas, kara leganto, kian laboron nia ĉefredaktoro van Spronsen plenumas por havigi manuskriptojn? Ricevinte artikolojn li devas elekti ĉar ne ĉio, kion li ricevas, taŭgas por la gazeto. Post elektado li devas korekti. Ĉar ne ĉiuj artikoloj havas la Zamenhofan puran lingvon, kiun ni ŝatas legi. Post tio li sendas la artikolojn al mi. Vi ja scias ke D. R. estas presata en Svedujo kaj van Spronsen loĝas en Nederlando. Dank' al miaj rilatoj al la presejo la gazeto povas esti presata je tre malalta kosto.

La finajn tralegadon kaj korekton faris Karl-Olof Sandgren. Li ankaŭ prizorgis la korekturlegadon kaj la aranĝojn de la artikoloj, la rubrikojn, la bildojn k.t.p. Fakte estas lia merito ke la gazeto havis tiel belan aspekton, tiel bonan lingvon kaj preskaŭ absolute malhavis korekturajn erarojn. Liaj lingvokapablo, ega precizemo kaj bona gusto rilate al tipografiaj aferoj faras lin perfekta redaktoro por nia gazeto.

En la fino de la pasinta jaro li tamen estis grave malsana kaj sentis ke li ne plu povos helpi al ni per la laboro pri D. R. Mi staris antaŭ grava problemo, ĉar mi komprenis ke mi ne kapablis sola fari la laboron tiel bone kiel frato Sandgren. Mi ankaŭ ege deziris, ke la alta nivelo de la gazeto ne perdiĝu. Mi preĝis al Dio kaj fine mi aŭdis ke nia frato fartas pli bone. Mi kontaktis lin kaj proponis ke li eĉ prenu pli grandan respondecon por la gazeto ol antaŭe. Kaj je mia granda feliĉo li akceptis tion. Ni nur petu Dion, ke Li konservu la sanon de nia frato, ĉar lia laboro por nia movado fakte estas tre grava. Karl-Olof Sandgren do denove eklaboros por D. R. kaj mi salutas lin bonvena en la redakcion.

Por van Spronsen kaj mi tio signifos grandan avantaĝon. Li cetere estas tiel okupata de grava laboro ke li ne povas partopreni en la redakcia laboro dum kelkaj monatoj.

La leganto trovos plurajn novaĵojn en la gazeto. La malnova, pure evangelia tono daŭre sonos de ĝiaj paĝoj. Ĝi daŭre servos kiel ligorgano, sed ankaŭ kiel batalorgano por Biblia kristanismo kontraŭ peko kaj falsaj religioj.

# Junaj religiaj seminarianoj ferias kaj lernas enketante pri la sentoj-celoj de vizitantoj de sanktejo

Armando Zecchin, IT

La mildaj montetoj ĉirkaŭantaj la lokon kaj la trankvileco de la ferianta animo favoris nian sciemon pri la kvanto kaj kvalito de la sento-konvinkoj movigantaj la pilgrimulojn. Preskaŭ ĉiutage, precipe dimanĉe kaj sabate, personoj, solece aŭ grupe, vizitis la Maria-sanktejon de Crea (Krea), montetara loko ĉe Alessandria (Alesandrja), en Norda Italio; ĉiun dimanĉon la homoj fariĝas amaso de mateno ĝis vespero: la sanktejeton plenplenigas, eĉ dum eksteroficialaj ceremonioj, personoj je absorbita medito kaj preĝoj kun kantoj antaŭ la Maria nigra statuo, nigrigita el la vaksokandelaj fumoj jam de plurjarcentoj bruligitaj antaŭ ĝi. Ankaŭ turismocelaj grupoj antaŭ tiu statuo haltadas silente, se ne preĝe. Kaj post tiu vizito, en la placo kaj hotelaj enirkoridoroj kaj ĉe vendobenkoj aŭ dumpiknikaj renkontiĝoj ronronas granda gajeco. Kio movas tiujn personojn? Kiel enpenetri kaj pliesplori ilian animan fundon? Pri la religiemo de praktikantoj kutime etnologoj kaj sociologoj parolas per varispecaj, kaj iom malŝatemaj interpretadoj, funditaj pli sur impresoj originantaj el eksteraj aspektoj ol sur sciencaj esploroj.

Ni kunaranĝis, por ebligi la kontentiĝon de tiu scivolemo, enketan rivelilon, parte parolan parte skriban, kaj por konstati ĉu la respondaĵoj rajtigus kaj konfirmas la ekirajn hipotezojn pri la korelativeco inter religiaj gestoj kaj intima religiemo. La surplacajn konversaciojn kun unuopuloj kaj grupoj, zorgis duopoj de teologilernantoj nur laŭ jena linio, malgraŭ devojiĝantaj rezistoj de enketitoj:

*Kial vi venis al la sanktejo?*

*Kion vi venis por peti?*

*Ĉu alifoje vi venis? Kontentiĝe kaj elaŭdite aŭ ne?*

Dek kvar duopoj enketis ĉe preskaŭ cent personoj. Ĉar la demandantoj vestas franciskane ŝajnis, ke estas prave forigata la ĝeno elvojiga kaj malpuriganta la konkludaron. La unuopaj konversacioj ne devis superi po kvin minutojn. La ordigitaj respondoj, skribe notitaj tuj post ĉiu unuopa enketado, liveris al ni la jenan kadron – 91% pilgrimas *por peti ion de Maria*: ion rilate la sanon aŭ/kaj familiajn aferojn aŭ/ kaj pri la stato en laboro ktp.

La konkludo enigas la ne novan tezon, ke la popola psikologio havas vere malmulte komplikan percepton: oni esprimas sin klarvorte. La peto pri io elstare konkreta tenas la unuan lokon. Oni atentu pri tiu punkto: la deziro ricevi favoron trenas la devotulon. Estas ĝuste tio kio aparte trenas la impresojn de la komuna dokta opiniaro, aparte kritike alarmita pro la materialeco kaj utilecismo de la aspiroj de devotuloj: sanktuloj kiel distribuantoj de favoroj kaj nenio plu, religio do almenaŭ supraĵa.

La sekvan dimanĉon, laŭ programo, ni disdonas al pli ol sescent personoj paperfoliojn kun la jena teksto, studita kaj taŭgigita por riveli ion apartan kaj konkretan pri la devota animo, kaj komparebla kun la rezultoj de la unua enketo:

Kial vi vizitas la Marian Sanktejon?

1) Por peti ion materian?
2) Por danki pro difavoro jam ricevita?
3) Nur por kunesti kun io sankteca aŭ kun Maria kaj Jesuo?
4) Por aliaj motivoj?

(Substreku la plej veran por vi).

Resendiĝis 432 responditaj enketiloj, trovitaj en du enteniloj manportataj de du infanoj.

Oni atendus konfirmon de la parola, surstrata kaj surplaca kaj laŭbutika, enketo. Male, la jesaj respondoj al tria enketilero estis 59%, kvankam 10% el ili same reliefigis ankaŭ unu el la du antaŭaj; dum malmultaj substrekis la kvaran. La unua kaj la dua enketileroj honoriĝis kune je 40%. Do, se, oni pilgrimas *por danki aŭ kunesti kun io sankteca aŭ kun Maria kaj Jesuo*, ĉu pilgrimuloj, eĉ la turisme flugtuŝantaj, posedas pli profundajn endopsikajn tavolojn pri kiuj ili ne tute spontane parolas? Fakte el la unua, tiu parola enketo pri tiu dimensio oni malmulte deduktis. Ŝajnis tiam, ke la motivo de la peto de io konkreta kaj sentebla estas la preskaŭ sola motivo de la pilgrimado.

Kiel interpreti tiun diverĝon de la buŝa enketo disde la skriba? Ĉu personoj sin detenas diri ion intiman kaj delikatan kaj ne senbare vorttradukeblan? La hipotezo, nur laŭvoja, apenaŭ skizita, valorus la penon esti plikonfirmita.

Ni decidas krei alian enketilon, kiel kontraŭpruvon, apenaŭ modifitan kompare kun la dua, sed strukturitan tiamaniere, ke la pridemandito rivelu sian intimon, kaj utiligotan la sekvan dimanĉon. Jen ĝi koncize:

Se via preĝo al Maria aŭ al Dio maltrafas, ĉu vi konkludas, ke:

1) ne valoras la penon preĝi, kaj pilgrimi?
2) oni bezonas esperi, ke estonte okazos pli kontentiga atingo en sociala-ekonomia-laboraj aferoj?
3) aŭ vi petis, samtempe aŭ ekskluzive, spiritajn Difavorojn, kiel fidelecon en la kredo, helpon por superi la malfacilaĵojn en la morala konduto aŭ vi nur kunestas por ĝoji je la ĉeesto de Dio kaj Maria?
4) aŭ vi nenion pensis?

(Substreku nur unu).

Respondon metis en du kestojn 401 enketitoj. La plejparto el ili substrekis samtempe la duan kaj la trian demandojn, nome: 2. oni bezonas esperi, ke estonte okazos pli kontentiga atingo en ama-ekonomia-laboraj aferoj? 3. aŭ vi petis, samtempe aŭ ekskluzive la spiritajn Difavorojn, kiel fidelecon en la kredo, por superi la malfacilaĵojn de la kredvivo, aŭ vi nur kunestas por ĝoji pri la ĉeesto de Dio kaj Maria?

Nur 2% substrekis la unuan demandon, dum nure la trian substrekis pli ol 30%.

En niaj postenketaj analizoj prenis

forton la tezo, ke personoj aspektas malpli religiemaj ol ili ene vivas, kaj revestas siajn profundajn simpatiajn sentojn al Dio kaj al Maria per io utila, per io ŝirmanta ilian intimon movitan, male, de vaga bezono doni, al aliaj, pli konkretan kaj materie tuŝeblan motiviĝon de sia preĝo.

Ni tiel klasifikis religiemon: a) unua baza grado – peti ion de Dio aŭ Sanktuloj, b) dua pli supera grado – peti, sed samtempe esti preparita akcepti la Dian decidon, c) tria la plej alta grado – harmoniigi sian pensadon kun la Dia kaj ĝoji esti ĉe Li. El la skrib-respondoj oni rajtas konkludi, ke la aludoj, tuŝantaj la duan kaj la trian demandpunktojn, estas konstateblaj ene de la sekretaj respondoj multe pli evidente, ol el la respondoj parolaj, antaŭ publiko.

Plifacilus publike elmontri, en publikaj deklaroj, sian inklinon al Dio per la preteksto de petpreĝo ol per la preteksto de simpla laŭdpreĝo dum ekzakte tiu ĉi okupas ne malofte la unuan lokon funde de la koro, kvankam konfuze. Io pudora, do intima kaj delikata kaj identiĝanta kun la persono mem, reflekse sindefende kovras per io pli modesta kaj humila.

Tamen, aŭ fakte, 39% substrekis nur la trian.

Ĉu tute prave oni rajtus diri, ke ĉe la sanktejaj devotuloj aŭ praktikantoj prisanktulan preĝan admiron oni snufas lezon al la unikeco kaj adorebleco de Dio? Kvankam ŝajne nomata pli ameme ol Dio, Maria elpaŝas kiel kiu kondukas al Dio! Ĉu oni rajtas insisti (kion faras etnologoj malmulte psikologiemaj aŭ hastemaj sociologoj), ke la amasa religiemo estas frukto de subalterneco kiu igas peti al Dio kio estas rifuzata de opresema socio se, rondcifere, almenaŭ 90% pravigas eltrovi sian neprofitan sintenon? ℘

---

# Sekretaria jarraporto pri la jaro 2007

Kompilis Els VAN DIJK, NL
kaj Pavel POLNICKÝ

“Jen mia lasta malgranda kontribuo al la sekretaria jarraporto.” Estis la unua frazo de mia raporto de 2006 pro la fino de mia sekretaria laboro post 26 jaroj. Feliĉe estis Pavel Polnický preta postsekvi min kaj tiu propono savis KELI-n el ebla embaraso. Mi restis estrarano pro la traktado de leĝaj kaj bankaj aferoj de KELI en Nederlando.

En la landoj en kiuj ankoraŭ estis funkciantaj grupoj malkreskis la membraro. Ne estas trovinta novaj estraranoj por la KELI-estraro. Dank’al malgranda

kvanto da respondeculoj povis nia unuiĝo plu vivi.

La kvalito de Dia Regno denove estis bona laŭ mi, grandparte pro la diligenta laboro de la redaktoro kaj la interesaj kontribuoj.

La estraranoj tenis kontakton pere de speciala interretadreso. Mi ne plu ricevis informojn de la landaj sekcioj.

La **Nederlanda** sekcio malpligrandiĝis. Mi kunorganizis Ekumenan Diservon kadre de kultura semajnfina kongreso kun la esperantistoj el la regiono de la urbo Münster en Germanio (najbara regiono). Ĝi okazis en la Evangelia Preĝejo apud la kongresejo en Nordwalde. Gerda Dercks restis la kasistino kaj mi prizorgis aliajn necesajn aferojn. La estraro nomumis s-inon Nel van Iperen-de Vries honora membro de KELI.

El **Litovio** atingis nin dum la Ekumena Kongreso informo pri la grava malsano de Erikas Laiconas (li mortis 28.1.2008).

Mi sendis plurfoje Bibliojn, Novajn Testamentojn, Dia-jn Regno-jn al **Afriko**.

Laste mi deziras al Pavel fruktedonan sekretarian laborperiodon.

*Els van Dijk-Kuperus*

Mi ne tro multe povas aldoni, kvankam mi al kelkaj personoj sendis kun la DR slipon kun la peto informi min pri la agado en koncerna lando – sed venis neniu informo.

La **Finnlanda** sekcio funkcias sub la gvido de Olavi Kantele kaj 10.3.2007 okazis kunsido kiu aprobis protokolon kaj jaran bilancon de la sekcio. Estis elektita nova kasistino Anna-Liisa Heikkinen. Frato Olavi kontaktis estonan grupon en Haapsalu kaj eĉ vizitis ilin kun la celo fondi estonan sekcion, sed tio ĝis nun ne realiĝis.

**Madagaskaro** – mi estis en reta kontakto kun pastoro Fidalalao Henriel, kiu intencas fondi landan KELI sekcion... Mi klarigis al li kio estas necesa fari, sed ĝis nun nenio nova.

**Rusio** – komence de la nova jaro mi ricevis retleteron de Larisa Kuzmenko. Ŝi estas en kontakto kun proksimume 15 kristanoj el diversaj partoj. Kelkaj el ili renkontiĝis dum tradicia aranĝo en urala urbo Tjumeno. Ŝi dissendas regule DR kaj laŭeble ili helpas al malriĉuloj per vestaĵoj kaj nutraĵoj. Dank´ al Dia Regno oni sentas sin parto de la monda kristanismo.

**Svedio** – dum la sveda kongreso okazis ankaŭ jarkunveno de la sveda sekcio de KELI. Nuna estraro estas jena: Mats Landfors – prezidanto, Agneta Järlström – sekretariino, Bengt O. Åradsson – kasisto kaj Leif Nordenstorm – anstataŭanto. Dum la ekskurso al malnova Rämen-preĝejo okazis esperanta Diservo. Aliĝis du novaj membroj.

**Ĉeĥio** – al nia sekcio aliĝis 4 novaj membroj, sed male aliaj “silentas”. Ni planas okazigi dum ĉi-jara kongreso de KELI jarkunvenon, kiu devas elekti novan sekcian estraron. Kelkfoje jare mi dissendas informan cirkuleron. En Poděbrady estas presata kaj dissendata nia gazeto Dia Regno kaj estis ankaŭ eldonita libreto Preĝu, kiun ni laŭ mendoj dissendas.

*Pavel Polnický*

## Financa Raporto de KELI 2007 **(Ĉiuj sumoj en EUR)**

| | | Bilancoj fine de la jaroj 2006 | 2007 |
|---|---|---|---|
| **Aktivoj** | PB-Ĝiro (PB = Postbank NL) | 1.962,68 | 2.937,93 |
| | PB-Rentemeerrekening (2,7%) | 31.546,74 | 32.390,64 |
| | UEA-konto kelk-p | 1.321,82 | 1.954,42 |
| | Kasista kaso | 26,51 | 59,86 |
| | E-Misio, Laiconas | 190,72 | 0,00 |
| | Pavel Polnický | 195,00 | 0,00 |
| | *Monrimedoj* | *35.243,47* | *37.342,85* |
| | Postulo UK-salono por KELI/IKUE | 0,00 | 80,00 |
| | Postulo el librovendado | 2.324,47 | 509,30 |
| | Stokoj (libroj) | 6.821,79 | 6.455,55 |
| | E-Misio, Kasedoj D.K. | 211,70 | 211,70 |
| | *Provizo* | *9.357,96* | *7.256,55* |
| | Transitaĵoj | 0,00 | 0,00 |
| | **Aktivoj sume** | **44.601,43** | **44.599,40** |
| **Pasivoj** | Kapitalo | 7.485,61 | 8.110,12 |
| | Saldoj negativa/pozitiva | **789,51** | **753,02** |
| | *Kapitalo entute* | *8.275,12* | *8.863,14* |
| | Dumvivaj membroj | 2.208,70 | 2.444,27 |
| | E-Misio | 8.097,94 | 7.988,22 |
| | Helpa kaso | 2.913,37 | 2.814,97 |
| | Junulara helpa kaso | 337,45 | 337,45 |
| | Kongresa rezerva kaso | 1.707,18 | 1.472,18 |
| | Literatura/Himnara kaso | 13.038,77 | 13.058,57 |
| | Informada/Varbada kaso | 214,72 | 214,72 |
| | Legaco C.P.W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Legaco E.t.O.-W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Legaco Boven | 1.865,00 | 1.865,00 |
| | *Fondusoj entute* | *35,220,93* | *34.743,18* |
| | Pasivo | 122,00 | 0,00 |
| | Kreditoroj | 450,58 | 450,58 |
| | Transitaĵoj | 532,80 | 542,50 |
| | *Pasivoj* | *1.105,38* | *993,08* |
| | **Pasivoj sume** | **44.601,43** | **44.599,40** |

## Rezulto 2007 kaj buĝetoj 2007, 2008 kaj 2009 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | Buĝeto 2007 | Rezulto 2007 | Buĝeto 2008 | Buĝeto 2009 |
|---|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | | |
| Presisto kaj sendado de DR | 2.950 | 2.765,00 | 2.950 | 3.000 |
| Perantoj | 20 | 0,00 | 20 | 20 |
| *Revukostoj* | *2.970* | *2.765,00* | *2.970* | *3.020* |
| Prezidanto | 30 | 0,00 | 30 | 30 |
| Sekretario | 80 | 70,29 | 80 | 80 |
| Redaktoro | 250 | 250,00 | 250 | 250 |
| Kasisto/Matrikulisto | 60 | 39,61 | 50 | 50 |
| *Estrarkostoj* | *420* | *359,90* | *410* | *410* |
| UEA-kotizo | 60 | 57,00 | 60 | 60 |
| Ĉambro de Komerco | 30 | 21,61 | 30 | 30 |
| Kaskontrolo | 40 | 40,00 | 40 | 50 |
| Bankkostoj | 40 | 40,80 | 45 | 45 |
| Merituloj | 25 | 0,00 | 25 | 25 |
| UK Lukostoj | 80 | 80,00 | 80 | 80 |
| *Ĝeneralaj kostoj* | *275* | *239,41* | *280* | *280* |
| Librovendado (kostoj) | 500 | 366,24 | 300 | 300 |
| Varbado (Inf./varba kaso) | 30 | 0,00 | 30 | 30 |
| Rabatoj de Perantoj | 25 | 14,00 | 20 | 20 |
| *Aliaj elspezoj* | *550* | *380,24* | *350* | *350* |
| **Elspezoj entute** | **4.215** | **3.744,55** | **4.010** | **4.060** |
| **Enspezoj** | | | | |
| Kotizoj/Abonoj | 2.800 | 2.774,99 | 2.700 | 2.650 |
| Kotiz- kaj kursdiferencoj | -10 | -16,54 | 15 | 15 |
| Adopta Kaso | 450 | 531,18 | 450 | 400 |
| *Kotizoj entute* | *3.410* | *3.289,63* | *3.165* | *3.065* |
| Librovendado | 700 | 509,30 | 500 | 500 |
| Rentumoj | 700 | 698,64 | 700 | 700 |
| Profito el kongreso | 0 | 0,00 | 0 | 0 |
| *Aliaj enspezoj* | *1.400* | *1.207,94* | *1.200* | *1.200* |
| **Enspezoj entute** | **4.640** | **4.497,57** | **4.365** | **4.265** |
| **Saldoj** | **425** | **753,02** | **355** | **205** |

## Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2006-12-31

### Aktivoj

| | |
|---|---|
| E-Misio, Laiconas | L. nuligis la kason ankoraŭ antaŭ sia subita morto. La restinta materialo de E-Miisio jam antaŭe transportis B. Eichkorn kaj K.H. Schaeffer al Germanio |
| Pavel Polnicky, CZ | Li gvidas kason por pagi la presadon kaj sendadon de DR el CZ |
| Stokoj: | Sanktaj Biblioj (6), Biblio nova NL (34), Biblio nova PL (40), Biblio 06 (655), Novaj Testamentoj broŝ. (73), Novaj Testamentoj bind. (27), Evangelioj laŭ Johano (237), Adoru Kantante (9), Nia historio (6), Esperante kaj Ekumene (7), Adoru (16). La libroj estas parte stokataj ĉe Els van Dijk (NL) kaj Jacques Tuinder (NL). La plej grandan parton de la Biblioj stokas por ni Bernhard Eichkorn (DE). |
| E-Miisio kasedoj: | Dimanĉa koncerto (73) La vendontoj estas petataj kontakti la kasiston. |
| Postulo el librovendado: | Bernhard Eichkorn (IKUE) kaj KELI financis 2006 la noveldonon de la Biblio. Kvanto 4000 ekzempleroj, 1000 financis KELI (1000 x 7,63 = 7630 EUR). Je la fino de la jaro estis venditaj 190 ekzempleroj. Laŭ interkonsento Bernhard Eichkorn stokas la bibliojn kaj la profito estas dividita 3:1. El tio rezultas la postulo de 509,30 EUR, kiu jam estas pagita. |

### Pasivoj

| | |
|---|---|
| Kapitalo: | Estas la libera kapitalo, alian vidu sub Fondusoj |
| Saldo positiva: | 753,02 EUR |
| Fondusoj | Helpa kaso: Estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson. Ni subtenis kelkajn personojn.<br>E-Miisio: Ni elspezis donacon por Evidente<br>Kongresa reserva Kaso: Ni pagis laŭstatute duonan kongreskotizon por prezidanto, sekretario, kasisto kaj redaktoro. |
| Kreditoroj: | Hungara kaso 355,33 EUR (Iren Bagi),<br>Brita kaso 95,25 EUR (Diana Richardson) |
| Transitaĵoj: | Antaŭricevitaj kotizoj en 2007: 80,00 EUR<br>Antaŭricevita kotizo por EK 12,50 EUR<br>Kongreskotizoj 2008: 450,00 EUR |

## Klarigoj pri la rezulto 2007 kaj la buĝetoj 2008/2009

Kotizoj pagendaj de

| | | |
|---|---|---|
| Membroj individuaj | 139 | (142) |
| Membroj familianaj | 10 | (10) |
| Membroj subtenantaj | 3 | (2) |
| Membroj dumvivaj | 21 | (21) |
| Membroj adoptitaj | 129 | (124) |
| | 302 | (299) (antaŭa jaro) |

| | |
|---|---|
| Nuraj abonantoj | 24 (28) |
| IKUE-abonantoj | 23 (23) |
| | 47 (51) |

Stagnas la membraro, kvankam estas aliĝoj, sed estis ankaŭ 9 mortintoj. En la kategorio "Membroj adoptitaj" ni havas novajn membrojn en Afriko. En Hungario 5 nun pagas la plenan kotizon.

**Librovendado:** La kostoj aŭ enspezoj por librovendado influas la saldon.

**Adopta Kaso:** Mono donacita de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Estas membroj en Albanio, Afriko, Bulgario, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Hungario, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio. Ili estas petataj kontribui "laŭforte" (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto). Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj. En 2007 enfluis 531,18 EUR
**Kotizoj** hungaraj 80, ĉeĥaj 120, rumanaj 100 EUR
**Donacoj** finnaj 92, .R.Puijenbroek, CH 111,78 EUR. Unuopaj membroj 27,40 EUR

Saldoj 2007, 2008 kaj 2009: La financa bazo de KELI estas ankoraŭ kontentiga. Sed kreskas kostoj por presado kaj sendado de DR.

Heilbronn, 2008-05-15 **Siegfried KRÜGER**, kasisto

# Tagordo por la jarkunveno de KELI 2008

1 Malfermo
2 Elekto de kunprotokolantoj
3 Fikso de la tagordo
4 Komunikoj
5 Funebra memorigo
6 Sekretaria jarraporto
7 Kasista jarraporto
8 Raporto de la kaskontrolantoj
9 Buĝetoj
10 Raporto de la redaktoro
11 Estrarelekto
12 Kongresplanoj
13 Ideoj & sugestoj de la membroj
14 Fermo

**Klarigoj:**

(11) Ĉi-jare finiĝas la deĵorperiodo de la kasisto: Siegfried KRÜGER kaj la sekretario: Pavel POLNICKÝ

(12) La loko por la ekumena KELI-kongreso 2009 ankoraŭ ne estas decidita. Unu propono estas Bulgario. Reprezentantoj de KELI kaj IKUE partoprenis komence de junio seminarion tie, por ekkoni la lokon kaj la eblecon tie organizi kongreson. Lastmomente ni ankaŭ ricevis proponon organizi kongreson en Vroclavo, Pollando. La UK 2009 ankaŭ okazos en Pollando, en Bjalistoko.

La kasokontrolo okazis en la ĝardeno de Naturamika Domo Stuttgart, kie ankaŭ la lokaj kaj regionaj Esperantistoj renkontiĝas ekde jaroj. Mi aldonas pri tiu evento foton, kiun mi faris. Estas videbla de maldekstre Horst Hub, Siegfried Krüger, Karl Heinz Schaeffer.

Kore salutas
Karl Heinz Schaeffer



# Aperas ĉe VoKo du serietoj

Gerrit BERVELING, NL

## Serieto "Voĉoj Kristanaj"

1 Evangelio laŭ Petro & La Morto de Jesuo kaj kio poste? (apokrifa el la Greka; kun akompana eseo)
2 Tertuliano – Apologio (el la Latina, 197 p.Kr.)
3 Sin-konservo (pri kristanismo kaj nukleaj armiloj; el la Nederlanda)
4 Al Diogneto (el la Greka; fru-kristana apologieto)
5 Kenneth Twinn – Unitariismo (originale en Esperanto)
6 (ne aperis)
7 Gerrit Berveling – Dio, Kristanismo, Aliaj Religioj (el la Nederlanda)
8 Evangelio laŭ Maria Magdalena (apokrifa; kun eseo)
9 Jam Temp' Está!; la "Kairos-dokumento" de sud-afrikaj kristanoj (pri ras-apartigo; el la Nederlanda)
10 Beatrijs (mezepoka Maria-legendo; el la Nederlanda)
11 Isai Sumber – Kie oni trovas tion en la Korano? (eta konkordanco)
12 Tertuliano – Kuraĝigo por la Martiroj (el la Latina)
13 Kantu al la Eternulo (ĉefe el-ĉeĥaj kristanaj himnoj)
14 De Goeij – La virino en la Judismo (el la Nederlanda)
15 Se KELI poetas (poezio originala el la rondo de K.E.L.I.)
16 Francisko de Asizo – Kantiko de l' Kreitaĵoj (dulingva)
17 Ekumena Jardeko de Eklezioj en Solidareco kun Virinoj
18 Jan Hus – Defendo de la libro pri la Triunuo (el la Latina)
19 La Remonstranta Frataro (informilo pri liberala eklezio)
20 De Wert – Interveno ĉe la generado (etika studaĵo pri artefarita gravedigo kaj rilataj temoj; el la Nederlanda)
21 La Praevangelio laŭ Jakobo (apokrifa; el la Greka)
22 La Evangelio Kopta laŭ Tomaso (apokrifa)
23 Hadewijch – Per Amo al Amo (trad. Wouter F. Pilger el la Nederlanda)
24 La Pasiono de Perpetua kaj Feliĉita (el la Latina)
25 Cipriano – La Unueco de la Katolika Eklezio (el la Latina)
26 La Duakanonaj Libroj, volumo 3: libroj de la Ortodoksiaj Eklezioj (el la Latina kaj el la Greka).

## Serieto "VoKo-numeroj"

1 Gerrit Berveling – Vi kion legus tie ĉi? (poemareto)
2 Gerrit Berveling – Tri 'stas tro (poemciklo); dua eldono ĉe FONTO.
3 (ne aperis)

4 Lukiano – Lukio aŭ Azeno (el la Greka); dua eldono ĉe FONTO.
5 Gerrit Berveling – Trifolio (poemetoj trilingve)
6 La Fragmentoj de Heraklito (el la Greka)
7 Seneko – Apokolokintozo de l' Dia Klaŭdio (el la Latina)
8 Seneko – Konsolo al sia patrino Helvia (el la Latina)
9 Horacio – Romaj Odoj (el la Latina); nun en *Antologio Latina*, ĉe FONTO.
10 Katulo – Amo malamo (el la Latina); nun en *Antologio Latina*, ĉe FONTO.
11 Seneko – Pri feliĉa vivado (trad. István Ertl el la Latina)
12 Zofia Banet-Fornalowa – Antoni Grabowski (originala eseo)
13 Lu Jixin – Invit' al Ĉinesko (originala poezio)
14 Marcialo – Da mav' estos neniam sat! (el la Latina)
15 Freya Berveling – Poemoj / Gedichten (dulingve)
16 El tiom da Jarcentoj (poemoj el la Latina)
17 Marko Tulio Cicerono – La Sonĝo de Skipiono (trad. Hjalmar Johannes Runeberg kaj trad. Gerrit Berveling el la Latina) ; nun en *Antologio Latina*, ĉe FONTO.
18 Tibulo – Elegioj (el la Latina)
19 Gerrit Berveling – La unuaj 25 jaroj en mia memoro
20 Gerrit Berveling – De duopo al kvaropo
21 Gerrit Berveling – Streĉitaj koroj
22 Lukiano – Veraj Rakontoj (el la Greka)
23 Gerrit Berveling – Odoj & aliaj poemoj
24 Louis Couperus – Fatalo (el la Nederlanda)

Pluraj titoloj estas elĉerpitaj; novaj en preparo.

La libretoj estas haveblaj ĉe la libroservo de UEA aŭ ĉe Gerrit Berveling.

Gerrit Berveling
Kalverstraat 8-B
8011 LH Zwolle
Nederlando
gerrit.en.madzy@planet.nl



**Gerrit BERVELING,** kiu zorgas pri la du serietoj de VoKo kaj tradukis la dua-kanonajn librojn, kiuj nun estas parto de la nova Biblio, li studis klasikan filologion latinan kaj grekan, kaj teologion. Li laboris kiel Remonstranta pastoro kaj instruas mezlerneje. Tradukis multon al Esperanto, ĉefe el la greka kaj latina, (kun-)redaktoro de *Monato* kaj *Fonto*. Membro de la Akademio de Esperanto.

# Sankta Luko pri la Regno de Dio

Ĉapitro 6
20 Kaj li levis siajn okulojn al siaj disĉiploj, kaj diris: Feliĉaj estas vi
malriĉuloj, ĉar via estas la regno de Dio. 21 Feliĉaj estas vi, kiuj nun
malsatas, ĉar vi satiĝos. Feliĉaj estas vi, kiuj nun ploras, ĉar vi ridos. 22
Feliĉaj vi estas, kiam oni vin malamos kaj vin izolos kaj vin riproĉos, kaj
elĵetos vian nomon kial malbonan, pro la Filo de homo.

Ĉapitro 9
60 Sed li diris al li: Lasu la mortintojn enteriĝi siajn mortintojn; sed vi iru
kaj proklamu la regnon de Dio. 61 Kaj ankoraŭ alia diris: Mi vin sekvos,
Sinjoro; sed unue permesu al mi adiaŭi tiujn, kiuj estas en mia domo. 62
Sed Jesuo diris al li: Neniu, metinte sian manon al la plugilo kaj rigardante
malantaŭen, taŭgas por la regno de Dio.

Ĉapitro 13
28 Tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj, kiam vi vidos Abraha-
mon kaj Isaakon kaj Jakobon kaj ĉiujn profetojn en la regno de Dio, kaj
vin mem forpelitaj eksteren. 29 Kaj oni venos el oriento kaj el okcidento,
kaj el nordo kaj el sudo, kaj sidiĝos en la regno de Dio. 30 Kaj jen estas
lastaj, kiuj estos unuaj; kaj estas unuaj, kiuj estos lastaj.

Ĉapitro 14
13 Sed kiam vi faras festenon, invitu malriĉulojn, kriplulojn, lamulojn,
blindulojn; 14 kaj vi estos feliĉa, ĉar ili ne povas rekompenci vin, sed vi
rekompenciĝos en la releviĝo de la justuloj. 15 Kaj aŭdinte tion, unu el la
kunsidantoj diris al li: Feliĉa estas tiu, kiu manĝos panon en la regno de
Dio.

Ĉapitro 17
20 Kaj kiam la Fariseoj demandis al li, kiam venos la regno de Dio, li
respondis al ili, dirante: La regno de Dio ne venas kun observado; 21 kaj
oni ne diros: Jen ĉi tie, aŭ: Jen tie! ĉar jen la regno de Dio estas inter vi.